

# La Riverego

Mia malkovro de Japanio	2	ESF-enrete: nova	
Serĉo de latineco kaj de reguleco	18	Esperanto-entrepreno	29
La latina moderniĝas	24	PIV en la reto	29
Recenze (Lucien A. Péraire)	22	ESF plifortigas Esperanton	30
Literature (Stephen Leacock)	25	E-renkontiĝoj	32

**Mia malkovro de Japanio**

*Ma découverte du Japon*





# Mia malkovro de Japanio

*Ĵenja (Yevgeniya) Amis*

## Parto I

*Voici la première partie d'une série sur le Japon que la rédactrice de La Riverego a visité en août 2012. Pendant trois semaines elle est restée avec des espérantistes japonais en utilisant le Pasporta Servo — un service d'hébergement gratuit à disposition des espérantophones. Une quinzaine des villes, deux mille photos et des souvenirs inoubliables dans le Pays du Soleil Levant !*

« Mia nomo estas Ĵenja kaj mi naskiĝis en Kioto... », mi diras en la sinprezento al japanaj esperantistoj (oni rigardas min kun malkredo) — « ... en Kioto-strato en Kievo, Ukrainio ». Jes, tio klarigas : oni ridetas. Kievo kaj Kioto estas ĝemelaj urboj, kaj kvin minutojn de mia naskiĝloko eĉ troviĝas japana parko kun toriĵo, pagodo, eta « Fuĵi-san » kaj aleo de sakuroj, plej longa en Eŭropo. Eble dank' al tiu ĉi hazardo mi ĉiam revis viziti Japanion. Ĉi-jare tiu ĉi revo realiĝis !

Verdire, la anonco pri la IJK-2012 en Japanio estis simple preteksto por viziti la landon. Pro tio eĉ

malgraŭ la nuligo de IJK ni ĉiukaze decidis viziti. Iom egoisme, sed por ni tio estis eĉ pli bone : ĉar oni havis tempon gastigi kaj ĉiĉeroni nin ! Tra la tuta vojaĝo kaj nun, reveninte, mi ne povas ne miri, kiom maloftan okazon ni havis vere sperti Japanion, ne nur supraĵe, kiel kutimaj turistoj, sed loĝante en la domoj de japanoj, kune manĝante, promenante kaj babilante.

Kutima por vojaĝemaj esperantistoj, la pasport-serva vojaĝ-maniero estas tute nekomprenebla por multaj, kaj mi ofte devas klarigi al amikoj kaj kunlaborantoj, kiel tio funkcias : ili simple ne



povas imagi, ke, eĉ ne estante riĉa, oni povas vojaĝi al tiom malproksima kaj multekosta lando, kiel Japanio, kaj sperti la landon tiel, kiel oni ne povas sperti ĝin eĉ estante la plej riĉa homo en la mondo ! Iam en la buso en Kioto okazis amuza miskompreno : aŭskultante nin interparoli en nekonata lingvo, unu virino demandis nian gastigantaron, la bonkoran sinjorinon TAHIRA, ĉu ŝi hazarde ne estas profesia ĉiĉerono. Ŝi diris ke ne, kaj provis klarigi, kiel ni konas unu la alian, kaj ke ni gastas en ŝia domo, kiel esperantistoj. La demandinto do tuj pensis, ke ŝi havas gast-domon kaj profesie gastigas eksterlandanojn !

Dum preskaŭ tri semajnoj ni vizitis dekkvinon da urboj kaj urbetoj sur du insuloj : Honŝu kaj Ŝikoku, kaj renkontiĝis kun pluraj esperantistoj kaj E-grupoj. Ni spertis la trankvilon kaj serenecon de la japana kamparo kaj la frenezan ritmon de Tokio. Ni « malkovris » multajn aferojn, manĝaĵojn kaj homojn. Mi plenigis la tutan kajeron per vojaĝnotoj, kaj ni alportis hejmen du mil fotojn. Ni spertis la aŭtentikan japanan gastamon, la ekstreman malavarecon kaj mirigan zorgemon de ĉiuj niaj gastigantoj kaj ĉiĉeronoj. Ĉiu persono, kiun ni renkontis, restos por ĉiam en niaj koroj !



## Hiroŝimo : 67 jarojn poste

Post 15-hora flugo el Montrealo, finfine, nia aviadilo surteriĝas en Hiroŝimo, la komenco de nia vojaĝo. 15-minuta veturo de la centra stacidomo, kie s-ro OŜIOKA renkontas nin, tra zigzagaj montecaj vojoj, kaj jen ni alvenas al la hiroŝima Esperanto-domo, kie loĝas la famaj esperantistoj Moritaka kaj Taeko OŜIOKA (antaŭ kelkaj jaroj ili

estis premiitaj pro sia internacia agado per Esperanto). Gesinjoroj OŜIOKA ĵus revenis de la UK en Vjetnamio, kaj en la lasta mesaĝo, kiun ni ricevis antaŭ la foriro, ili skribis : « Ni jam revenis el Vjetnamio kaj mi jam komencas kuiri. » Ni pensis, ke certe estas iu miskompreno : ne temas pri la

kuirado *por ni* : ni ja alvenas nur post unu tago ! Sed, vidinte la vespermanĝon, mi komprenas, ke tio ne estis miskompreno : nin atendas vera festeno konsistanta el almenaŭ deko da pladoj, interalie, tempuro (japanaj fritajoj), floroj de *okura* (estas nur unu semajno en la jaro, kiam oni povas manĝi ilin — kaj, bonŝance, ni trafis tiun semajnon ; vidu la bildon) kaj malvarmaj nudeloj — *somen* — kun akvomelono. Plej malfacile estis manĝi la nudelojn per bastonetoj, kaj mi ekbedaŭris, ke mi ne ekzercis min pri manĝado

per bastonetoj pli bone antaŭ la vojaĝo.

Lacegaj post preskaŭ du tagoj sen dormo, ni iras al nia bela japanstila tatama ĉambro. En modernaj japanaj domoj ofte estas japanstila ĉambro, tre utila por la gastoj : en ĝi tute ne estas mebloj aŭ lito, kio permesas gastigi multajn personojn samtempe. La planko estas kovrita per tatamoj — tapiŝoj el plektita riz-pajlo, kaj en la angulo — bela kaligrafiaĵo kun vazo — *tokonoma*, la plej honora parto de la ĉambro. Malsimile al eŭropanoj aŭ usonanoj, kiuj kutimas havi apartajn dormoĉambrojn, la ĉambroj en tradiciaj japanaj domoj ofte estas multifunkciaj : ĉiuvespere oni metas matracon kun littukaĵoj, kaj ĉiumatene oni forigas ĝin — jen bona utiligo de malgranda spaco.

## Kiam la tempo haltis...

Hiroŝimo situas en tre bela loko — en la montaro apud la Interna Maro. Bedaŭrinde, la urbo estas fama ne pro siaj belaj pejzaĝoj, sed pro la teruraĵoj de atombombado. Laŭ s-ro OŜIOKA, ofte vizitantaj esperantistoj imagas Hiroŝimon daŭre kuŝantan en ruinoj, kio tute ne veras. La urbo renaskiĝis : ĝi estas moderna urbo kun granda aŭtoindustrio, sed la pac-muzeo, pluraj monumentoj kaj la konservita bombita kupoldomo, 600 m super kiu eksplodis la bombo, estas porĉiamaj atestantoj pri tio, kio okazis tie



Ĉ. 600 m preskaŭ ekzakte super tiu ĉi kupol-domo estis la epicentro de la eksplodo

antaŭ 67 jaroj. Provizitaj de mapoj kaj gvidlibroj (du el kiuj estas eldonitaj de gesinjoroj OŜIOKA), ni iras promeni en la urbo. Pacmuzeo estas nia unua celo.

La 6an de aŭgusto 1945, je la 8:15 matene, la tempo haltis en Hiroŝimo. 140 mil personoj perdis la vivon. Iuj tute elvaporigis, eĉ sen lasi la ostojn — ja temperaturo en la epicentro atingis kelkajn milojn da gradoj. Iuj suferis longajn horojn, tagojn, monatojn poste. Inter ili multaj infanoj, kiuj devige laboris konstruante ŝirmejojn. Oni povas vidi fandiĝintan sablon kaj tute detruitajn etajn uniformojn de lernejanoj. Oni vidas bildojn de infanoj, kiuj desegnis spertitajn teruraĵojn : jen la aro de kadavroj kuŝantaj laŭlonge de la rivero — por identigo. Jen la homoj kun vizaĝoj ŝveliĝintaj pro la radiado kaj starantaj haroj plenaj de radioaktiva polvo...



La muzeo ĉi-jare prezentis ankaŭ la kolekton de dokumentoj el Usono, kiuj estis ĵus malsekretigitaj. Ili plie montras la hipokritecon de la decido senaverte bombi Hiroŝimon kaj Nagasaki — supozeble, por fini la Pacifikan militon, sed en la realo, por testi la atombombon en la realaj cirkonstancoj (pro tio oni eĉ

malpermesis la « kutiman » bombadon de kelkaj « kandidat-urboj », por vidi la plenan efikon), « montri la muskolojn » al Sovetunio kaj eviti ties influon, ĉar Japanio jam fakte komencis la pac-negocojn kun ĝi. Estas eĉ letero de usonaj sciencistoj, kiuj provas konvinki la usonan registaron pri la danĝero de tia senaverta atako... Mi rememoras, ke kelkajn tagojn antaŭ nia vojaĝo mi aŭskultis la intervjuon de unu el la usonanoj, kiujn oni ordonis faligi la bombon, kaj kiu daŭre tre sincere kredis, ke tio estis necesa por fini la militon...

Sed, feliĉe, Hiroŝimo renaskiĝis — oni komencis purigi la urbon tuj post la atako, kaj en kelkaj partoj de Hiroŝimo la tramoj funkciis jam kelkajn semajnojn post la atako. La urbo fariĝis vivanta rememorigo pri la danĝeroj de nukleaj armiloj. En

### Kiam la urbo malaperis...



la muzeo la tutan muron kovras la protest-leteroj, adresitaj al la mondaj potenculoj, prezidantoj kaj ĉefministroj, de la sinsekvo de hiroŝimaj urbestroj kontraŭ uzado kaj testado de nukleaj armiloj. Hiroŝimo

fakte komencis la tutan movadon de « Urbestroj de Paco » : movado de nun ĉ. pli ol kvin mil urboj (reprezentantaj ĉ. miliardon da personoj), kiuj kampanjas por forigo de nukleaj armiloj. La loĝantoj de Hiroŝimo deziras, ke tiu ĉi teruriga sperto tamen helpas konstrui mondon sen nukleaj armiloj. Ni esperu, ke oni aŭskultos...

### Milo da pac-gruoj

Apud la muzeo estas diversaj monumentoj : jen al mortintaj instruistoj kaj infanoj, jen al miloj da mortintaj koreoj, loĝintaj en Hiroŝimo por devigaj laboroj. Tre kortuŝa estas la monumento al knabineto SASAKI Sadako, kiu reprezentas ĉiujn senkulpajn viktimojn de militoj. Ŝi havis du jarojn, kiam la bombo estis faligita. Forblovita pro la eksplodo el la fenestro, ŝi tamen supervivis la

atakon kaj kreskis tute sana. Tamen en 1955 ŝi estis diagnozita je leŭkemio, kaj la kuracistoj donis al ŝi nur unu jaron por vivi. Ŝi famiĝis pro la mil pacgrupoj, kiujn ŝi faris, malgraŭ teruraj doloroj, kredante, ke se oni faras mil paperajn grupojn, la dioj realigos la deziron. Ŝia deziro estis simple vivi... Ĉar tiutempe en Japanio mankis papero, ŝi uzis kiun ajn paperon, kiun ŝi trovis, inkluzive la volvaĵon de medikamentoj. Post la morto de Sadako, ŝiaj amikoj kampanjis por kolekti monon por ŝia monumento, kiu estis inaŭgurita en 1958. Ĝi diras « Estas nia krio. Estas nia preĝo. Paco en la mondo. » En tiama Sovetunio, kie mi naskiĝis, oni tre bone konas ŝian rakonton kaj eĉ havas kelkajn kantojn pri ŝi. Eble pro tiu ĉi malgaja rakonto, oni vidas pacgrupojn ĉie en Hiroŝimo — ofte ili estas plektitaj kune kaj foje oni faras tutajn bildojn el la aro da plektitaj grupoj.

## « Kiu estas la ĉefministro? »

Promenante en la parko, ni renkontas grupon da japanaj junuloj, kiuj volas babilu kun ni en la angla. Ili demandas



min, ĉu mi scias, kiu estas la nuna japana ĉefministro? Mi hontas, ke mi tute ne memoras — ja ili ŝajne ŝanĝiĝas ĉiujare, kaj ĉiam, kiam mi lernas, jam estas nova ĉefministro ! Junuloj ridas, ĉar tio fakte estis ilia sekva demando : « Kial do japanaj ĉefministroj tiom ofte ŝanĝiĝas? » Poste ili montras bildojn de ĉiuj lastatempaj ĉefministroj kaj demandas, se mi devus enamiĝi al unu el ili, kiu li estus? Mi elektas Koizumi, kaj ili estas kontentaj : « Jes, li estas la plej bona. »

Tiu ĉi babilado, fakte, ne estas simpla scivolemo — estas ilia somera tasko — deviga ekzerciĝo pri la angla kun eksterlandanoj. Lernado de la angla estas tre malfacila por japanoj, kaj ili investas multe da tempo kaj mono por lerni ĝin. Kaj pro tio, ke oni ĉefe lernas nur la skriban anglan, parolado kun multaj eksterlandanoj apud la Pac-muzeo estas bona okazo iomete ekzerciĝi pri la parola parto. Post kelkaj minutoj nin invitis babilu alia infano — 7-8-jara knabino kun sia panjo. Ŝi demandis pri japanaj manĝaĵoj kaj ĉu ni gustumis diversajn





specialaĵojn de Hiroŝimo. Kiel donacon por la tempo paroli kun ŝi ni ricevis... nu kompreneble, pacgruojn !




## La flosanta sanktejo

Nia sekva celo en la Hiroŝima regiono estas la insulo Mijaĵima. Por atingi ĝin oni devas trajni ĉirkaŭ horon, kaj tiam preni pramŝipon. La insulo estas majesta : kovrita de verdaj montoj kaj ĉirkaŭita de blua akvo, sur kiu kvazaŭe flosas la ruĝa sanktejo Icukuŝima — ĝi aspektas kiel io tute surreala. La insulo estas plej konata pro tiu ĉi sanktejo kun la grandega toriĵo (O-Torii) : pordego en akvo — unu el la plej konataj vidindaĵoj en Japanio kaj parto de la Monda Heredaĵo de UNESKO. Toriĵoj markas la enirejon al ŝinto-sanktejo : ili estas jen lignaj (plej ofte farbitaj

ruĝe), jen ŝtonaj, jen eĉ betonaj. Tiu ĉi toriĵo estas tre speciala, ĝuste pro tio, ke ĝi staras en la akvo. La sanktejo staras sur platformo en la akvo kaj ŝajnas, ke ĝi vere flosas sur akvo. Kvankam la toriĵo en akvo sur tiu ĉi loko staras ekde la 12a jarcento, la nuna toriĵo datiĝas de 1875. 16 metrojn alta, ĝi estas farita el putroimuna kamforarbo.

Icukuŝima-sanktejo ne estas la sola vidindaĵo sur la insulo : ĝi havas tutan aron da aliaj vidindaĵoj, ŝinto-sanktejoj kaj budhismaj temploj, kiuj tute harmonie kunvivas. Foje ŝinto-sanktejo estas eĉ integra parto de pli granda budhista komplekso. Por ni, okcidentanoj, tiu ĉi paca kunvivado estas aparte interesa, ĉar, akceptinte kristanismon, la praaj religioj estis tute forgesitaj kaj eĉ diabligitaj (ekzemple, en la ukraina lingvo la vorto « pagana » en la nuna lingvaĵo signifas « malbona »).



La insulo estas sufiĉe granda kaj eĉ havas kelkajn urbetojn. Iuj lokanoj estas posedantoj de multenombraj restoracioj kaj vendejoj. Sed, krom lokanoj, Mijaĵima havas aliajn nekutimajn loĝantojn : cervojn ! Malsame ol la plejparto de la aliaj cervoj, la japanaj cervoj (*ŝika*) ne perdas makulojn je maturiĝo. Tiuj ĉarmaj bestoj loĝas sur la insulo de jarcentoj kaj tute ne timas homojn aŭ aŭtojn. Sed atenton ! Kiom ajn ĉarmaj estas la cervoj, ili transformiĝas en monstrojn, kiam ili flaras ion ajn manĝeblan (kaj ĵurnaloj kaj eĉ paperaj ventumiloj apartenas al « manĝebla » kategorio) ! La cervoj persekutos vin, ĝis vi donos la manĝaĵojn al ili ! Fakte, malgraŭ la oficiala malpermeso nutri cervojn, homoj ofte faras tion, kaj la bestoj iamaniere sukcesas trovi paperojn kaj kun plezuro manĝas ilin (eĉ malgraŭ tio, ke la insulo mem estas ekstreme pura).

## Ĉeburaŝka. *Kaŭaii* !

Revenante hejmen, en memoraĵ-vendejo mi rimarkas ion tute strangan : Ĉeburaŝka ! Ĉeburaŝka estas grand-orela ĉarma rolulo de rusa infan-rakonto. Mi tute ne povis imagi, ke iu ekster rus-lingvio povus koni tiun beston ! En Japanio oni ne nur konas lin, oni eĉ vendas memoraĵojn kun Ĉeburaŝka, kiu tenas en la manoj la faman japanan kuketon — *manĝu* — kun skribaĵo « Hiroŝimo » sur ĝi !



Kompreneble, mi ne povis ne aĉeti tian perfektan ekzemplon de interkultura kunfandiĝo ! Kiel evidentiĝis, Ĉeburaŝka tre popularas en Japanio kaj eĉ havas plurajn filmojn. Mi poste demandis al unu esperantistino, kial li tiom populariĝis? La respondo estis : « Ĉar li estas tiom ĉarma ! » Etaj (sed ne nur etaj) japaninoj adoras ĉion ĉarman (*kaŭaii* !), kaj ofte havas iun ĉarman monstreton alkroĉitan al sia mansako (mi devas konfesi, ke ankaŭ mi alkroĉis Ĉeburaŝka-n al mia mansako). La ĉarmaj monstroj videblas ĉie : sur reklamoj, afiŝoj, ŝildoj kaj eĉ sur la alvokoj donaci sangon ! Kaj pro tio, ke en Japanio ĉio plej bone vendiĝas per ĉarmaj monstroj, ĉu eble ankaŭ ni adoptu iun ĉarman beston, kiel Ĉeburaŝka? Anstataŭ *manĝu*-kuko ni metu la Esperantan stelon kaj nomu ĝin, ekzemple, Esperaŝka, kaj tiel certigu la finan venkon en Japanio ☺



## Ŝinkanseno malfruas... ne sufiĉe !

Post la du perfektaj tagoj en Hiroŝimo ni veturas al Kioto. Estas mia unua fojo en Ŝinkanseno — la fama japana trajno, unu el la plej rapidaj en la mondo. Dum sia 45-jara historio kaj 6-miliarda kvanto da pasaĝeroj, en Ŝinkanseno neniam okazis akcidento, kiu kaŭzis morton. « Ŝinkanseno neniam malfruas », diras mia edzo Joel, loĝinta du jarojn en Japanio. La alventempo de Ŝinkanseno averaĝe varias de la celita tempo je 6 sekundoj, kaj en iuj direktoj tiaj trajnoj venas ĉiujn kelkajn minutojn. Nia trajno kuras tiom rapide, ke la fostoj de pontoj kvazaŭ tute malaperas, sed ial la rapideco de 240-300 km/h tute ne sentiĝas. Sed ironie, ĝuste en tiu ĉi tago, Ŝinkanseno malfruis je tuta horo, pro pluvego (aŭ eble pro tiu fanfaronado de Joel, mi ne certas). Nia gastigantino, sinjorino TAHIRA Masako diras, ke se ĝi malfruiĝas je du horoj, oni redonas monon



(« do, ĝi malfruiĝis, sed ne sufiĉe ! » mi ŝercas). Ŝi rakontas, ke iam vizitinta esperantisto el Ĉeĥio miris, ke oni anoncis 5-minutan malfruon de Ŝinkanseno : « En Ĉeĥio kvin-minuta malfruo estas konsiderata 'ĝustatempe' », li diris.

La grandega stacidomo de Kioto estas plena je homoj. Estas la tempo de la festo ulambano, kiam ĉiuj japanoj revenas hejmen por honori la mortintajn prapatrojn. Estas varmege kaj ekstreme humide — aŭgusto ja estas la plej varma monato en Japanio. Por iom malvarmigi la lokon, en la stacidomo de Kioto oni disĝustetigas akvon — tio iomete malaltigas la temperaturon, sed aldonas al la jam ekstrema humideco.

## « Tahira-hotelo » en Kioto

Eta deflankiĝo. Kiam mia edzo Joel sendis al s-ino TAHIRA mesaĝon pri nia intenco vojaĝi al Japanio, jam ene de du aŭ tri tagoj ni ricevis la tutan provizoran itineron, jam kun renkontiĝoj kun pluraj Esperanto-kluboj ! Tio estis nur antaŭgusto de la vere nekredeblaj japanaj gastamo kaj zorgemo, kiujn ni spertis dum nia restado. Ni estas ege dankemaj al ŝi, kaj ĉiuj bonkoruloj, kiuj gastigis kaj ĉiĉeronis nin !

Gesinjoroj TAHIRA loĝas en centjara eta domo. Mia gvidlibro nomas tiajn longajn lignajn vic-domojn « Maĉija »-domoj (« urba domo ») kaj klarigas, ke

en la malnova tempo oni pagis impostojn laŭ la surfaco de fasado : do, pro tio la fasado de tiaj domoj estas malgranda, sed la domoj mem estas longaj. La tre eta kuirspaco (ĉar ne vere aparta ĉambro) en tiaj domoj troviĝas en la koridoro — unu ŝtupon sub la nivelo de la vico de tatamo-ĉambroj ; malantaŭe « maĉija »-domoj ofte havas etan ĝardenon. Esenca parto de ili estas la glitantaj pordoj, kiuj ebligas jen grandan salonon por akcepto, jen kelkajn dorm-ĉambretojn. S-ino TAHIRA diras, ke oni nomas tiajn malnovajn vicdomojn « harmonikaj domoj » (ĉar tiel ili aspektas !) kaj ŝercas, ke la najbaraj domoj fakte subtenas unu la alian kaj tiel ne falas.

Je nia alveno, Masako donas al ni du kaskojn, por meti kaze de tertremo — bona rememorigo pri tio, ke ni estas en loko, kie oftas tertremoj (« tio donus novan signifon al la esprimo 'morti pro Esperanto', se oni estus mortigita per falantaj Esperanto-libroj ! » ŝercas Joel — ĉar ŝia domo plenplenas je Esperanto-libroj). La domo de gesinjoroj TAHIRA jam vidis multajn tertremojn — bonŝance, ĝi neniam estis severe damaĝita, sed tamen ĝi kelkfoje iomete moviĝis, kaj pro tio oni bezonas iom da forto por movi la glitantan pordon. Tre ofte tiu ĉi modesta



Kun sinjorino TAHIRA en Kioto

domo estas amika « hotelo » por esperantistoj vizitantaj Kioton. Same estis por ni — fakte, ĝi fariĝis nia « kansaja bazo » (Kansajo estas regiono de Japanio, kie situas Kioto, Osako, Kobe, i.a.), de kie ni ekskursis al aliaj urboj preskaŭ ĉiutage. Mi certas, ke ĉiuj iliaj vizitantoj same multe ĝuis, kiel ni, la babiladon kun gesinjoroj TAHIRA !

## « Elstara lingvo »

Kaj Masako, kaj ŝia edzo Minoru multege laboras. Masako — pri Esperanto : kiel UEA-aktivulo (delegito, iam komitatano, ktp.), JEI-aktivulo kaj provlegisto de pluraj E-eldonaĵoj, por nomi nur kelkajn. Minoru laboras kiel instruisto de la angla en lernejo kaj en « ĝuku » — speciala lernejo, kiu preparas gejunulojn por la malfacilaj universitataj enir-ekzamenoj. Laboranta en diversaj urboj, li ofte foriras je la sesa kaj revenas ĉirkaŭ noktomezo — aldone al

tio, li foje provlegas lernolibrojn pri la angla ! Minoru, tamen, tute ne plendas : tia vivo permesas al li multe vojaĝi per la rapidegaj trajnoj, Ŝinkanseno, lia plej ŝatata loko ! « La angla estas por enspezi monon, Esperanto — por elspezi », ŝercas Minoru.

Se Esperanto estas malfacila por japanoj, la angla



por ili estas malfacilega. Fakte, la japana ideogramo por « la angla lingvo » povas ankaŭ signifi « elstara lingvo », kaj ĉiuj strebas perfektigi en ĝi. Sed malgraŭ tio, ke oni elspezas amason da mono (kaj tempo) en « ĝuku », kaj ofte eĉ tute bone komprenas la skribitan anglan, sufiĉe malmultaj japanoj sukcesas flue paroli ĝin. Por fari universitatan ekzamenon oni devas scii (almenaŭ skribe) ĉ. 5 mil vortojn, povi legi kaj kompreni sufiĉe malfacilajn tekstojn kaj ankaŭ traduki (ambaŭdirekte). La parolado ne estas parto de la ekzameno, kaj oni povas tute bone fari la ekzamenon sen diri eĉ unu vorton en la angla. Minoru diras, ke ofte estas la kulpo de instruistoj, kiuj tuj korektas ĉiun eraron kaj tial timigas la lernantojn. Povas esti, ke estas tiel ankaŭ ĉar japanoj ĝenerale estas tre perfekte maj kaj timas embarasiĝi pro iu eraro — aŭ ĉar por lerni la lingvon oni ofte devas paroli pri si, kion japanoj ankaŭ ne emas fari.

## Vizito al Oomoto

De nia « kansaja bazo » Kioto ni trajnas al Kameoka — unu el la du ĉefaj centroj de la religio



Kun Toŝi en la Oomoto-centro en Kameoka

Oomoto, kien ni estas invititaj de ties Internacia Fako por partopreni en la junulara festivalo okaze de la 120a datreveno de Oomoto. Kameoka estas urbo kun ĉ. 90 mil loĝantoj kaj troviĝas apud la montaro kaj la bela Hozu-rivero, kies zigzagan

vojon oni povas vidi el la trajno. La vorto « Kameoka » signifas « testuda monteto », kaj tute prave, ni ofte vidas testudojn trankvile kuŝi sur la ŝtonoj en laĝetoj (amuze, la ideogramo por testudo estas unu el la manpleno da ideogramoj, kiujn mi lernis dumvojaĝe, ĉar ĝi fakte iom aspektas kiel testudo). La Oomoto-Centro troviĝas nur dek minutojn piede de la stacidomo kaj nemalproksime

de la urbocentro, sed tie estas tiom trankvile, ke oni povus pensi, ke oni estas tute ekster la urbo.

## Toŝi, nia « bona ĝino »

Antaŭ nia alveno, nia ĉiĉerono en Oomoto — s-ro OKUŬAKI Toŝiomi (Toŝi) demandis, ĉu ni havas iujn dezirojn, kaj se jes, li provos realigi ilin. Ni petis, ke se, hazarde, dum la festivalo okazos te-ceremonio, ni volas partopreni ĝin, ĉar mi neniam faris tion antaŭe. Antaŭ nia alveno Toŝi informas nin, ke ni

bonŝancas, ĉar ja okazos te-ceremonio dum nia vizito — fakte tuj post nia alveno. Ni alvenis iomete malfrue kaj timis maltrafi la ceremonion, sed, feliĉe, ĝi ankoraŭ ne komenciĝis. Ni iras al la te-ceremonia domo kaj devas enskribi niajn nomojn en la gastolibro — per inko kaj tuĉpeniko. Joel studis la japanan, kaj do sukcesas pene skribi niajn nomojn per katakana alfabeto (« Sufiĉe proksime », Toŝi diras). Kiam mi konstatis, ke ne estas aliaj nomoj en la listo, mi komprenis, kial la ceremonio ankoraŭ ne komenciĝis : ni estas *la solaj* invititoj ! Mi eksuspektas, ke Toŝi fakte estas ĉionscia kaj ĉionpova ĝino, kiu magie povas realigi ĉiun deziron. Tiu suspekto poste konfirmiĝis : jen mi havas iun malfacilan demandon — kiel respondo venas tuta libro, kiu detale pritraktas ĝin. Jen mi bezonas tradukon aŭ interpreton — Toŝi estas apude por helpi. Jen mi petas kutiman verdan teon — kaj post kelkaj minutoj antaŭ mi aperas belega tebovlo kun luksa te-ceremonia maĉĉa-teo. Jen ni bezonas trajnhoraron — ĝi venas elprintita, kun ĉiuj klarigoj. Eĉ kiam ni devis foriri, Toŝi iris kun ni ĝis Kioto, malgraŭ niaj protestoj, ke ne necesas, por



certigi, ke ni kaptas la ĝustan trajnon (bonŝance por ni, ĉar nia trajno estis nuligita, kaj li do devis rearanĝi la itineron !). Ĉar Toŝi laboras en la Internacia Fako, li ofte devas zorgi pri vizitantaj eksterlandanoj. Li estas tre entuziasma pri sia laboro, tamen eble malfacila parto de lia laboro estas « varti la infanojn », kiel ni, kiuj ne komprenas la japanan lingvon aŭ ĉiujn subtilaĵojn de la japana etiketo.

## Aŭtentika te-ceremonio

La oomotanoj ofte lernas kaj praktikas diversajn artojn (kaligrafio, ceramiko, batalartoj, tradicia japana muziko kaj no-teatro). Ankaŭ



te-ceremonio estas unu el praktikindaj artoj. La te-ceremonio, kiun ni spertas, estas fakte ekzercado — ĝin okazigas

du belaj virinoj, sub la gvido de sperta instruistino, ĉiuj en tradiciaj vestaĵoj. (En mia notlibro mi skribis « knabinoj » — tiom june ili aspektis ; sed kiel mi eksciis poste, ili estis pli aĝaj ol mi pensis, ĉar ĝenerale japaninoj aspektas pli junaj ol eŭropaninoj — eble ĉar ili ĉiam bone kaŝas sin de la suno.) La ceremonio komenciĝas eĉ antaŭ nia



eniro en la ĉambron (surgenue). Antaŭ la enirejo ni ricevas etan falditan ventumilon, kiun oni en diversaj momentoj devas meti jen antaŭ sin, jen flanken. Ĉiuj agoj de la junulinoj aspektas tre graciaj kaj bone ellernitaj. Jen oni purigas la bovlojn, la ilojn, jen boligas kaj verŝas akvon, jen ŝaŭmigas la teon. Ĉio ĉi aspektas kiel teatraĵo, tiom lertaj ili estas. Antaŭ ol trinki la teon, ni manĝas la dolĉaĵojn por mildigi la fortan guston de la teo : sukeritaj soj-faboj kaj ĵeleo. Antaŭ ol trinki la teon, oni devas turni la bovlon tri fojojn por plene admiri ĝin. Oni turnas tri-foje ankaŭ post la trinko. Mia tebovlo estas blua, kun foliaj desegnaĵoj — ĉar estas somero, ĝi havas tiajn florajn motivojn. La stilo de tasoj ŝanĝiĝas laŭ la sezonoj. La teo mem estas verdege-verda, kiel farbo, tre ŝaŭmeca kaj bongustega.

Estas aparta talento sidi surgenuie tiom longe, sen ke la kruroj endormiĝu — niaj kruroj ja iom doloras post la longa sidado, tial ni eĉ pli aprezas la konsilon de la te-mastrino moviĝi iomete meze de la ceremonio.



## Vivantaj ŝtonoj de Kameoka

Je la kvina matene oni komencas ludi muzikon tra la Oomoto-Centro — ĝi komenciĝas per mallaŭtaj perkut-muzikiloj, kies laŭteco kreskas, kaj al kiu poiomete aldoniĝas aliaj muzikiloj kaj voĉo. Estas tempo por vekiĝi. Eble pro la 13-hora tempodiferenco, aŭ eble ĉar en somero en Japanio lumiĝas pli frue ol en Nord-Ameriko (ĉar oni ne ŝanĝas al somera tempo), ni ĉiuokaze vekiĝas eĉ antaŭ la kvina. Matenpreĝo (kvankam ne deviga por ni) estas je la sesa.

La plejparto de la homoj en la manĝejo estas gejunuloj kaj infanoj — partoprenantoj en la festivalo, sed kiu ajn oomotano povas veni tien por unu aŭ kelkaj tagoj de ripozo aŭ meditado. Ankaŭ internaciaj vizitantoj kaj esploristoj ofte venas — ekzemple, praktikantoj de batalartoj naskitaj en Oomoto, kiel ajkido.

La loĝeja kaj administra konstruaĵo estas tute nova, kaj ĝin daŭre plenigas bona fojnecaodoro de nova tatamo. La domo estas tre bela kaj

moderna, kaj nia gastĉambro estas tiom bona, kiel en hotelo ! Tre plaĉe, ĉiuj skribaĵoj en Oomoto estas en la japana kaj en Esperanto, do ni trovas ĉion senprobleme. Fakte, Esperanto estas konsiderata unu el la praktikindaj artoj, kaj multaj oomotanoj lernas ĝin. Kelkaj grupoj de infanoj kaj junuloj havas T-ĉemizojn kun E-skribaĵoj, kaj multaj el ili ĝojas saluti nin en Esperanto kaj eĉ iom babili dum la manĝo.

Matene ni promenas en la tereno kaj... vizitas ŝtonojn ! La ŝtonoj en la Oomoto-Centro en Kameoka multas — ŝtonetoj kovras la teron inter la konstruaĵoj (en la vestiblo eĉ troviĝas rulseĝo kun grandaj pneŭmatikaj radoj, speciale por bone ruliĝi sur la ŝtonetoj). La grandaj ŝtonoj staras, kovritaj de musko, kiel gardistoj. Ili vidis multon — silentaj, ili tamen rakontas la historion de tiu ĉi loko. Ili parolas pri la malnova



Kamejama-kastelo

kastelo Kamejama, kiu staris tie ĉi ekde la 16a jarcento. Ili parolas pri ĝia morto, kaj ankaŭ pri ĝia dua morto : dum la t.n. dua Oomoto-afero la japana registaro detruis la restantan fundamenton de la kastelo. Kial la tiama japana registaro tiom malŝatis Oomoton? Simple ĉar ĝia kungvidanto, DEGUĈI Onisaburo, aŭdacis malferme kontraŭstari la japanan militarismon...

Du grandegaj ŝtonoj estis eĉ portitaj de aliaj lokoj. Laŭdire, ili havas kuracajn povojn, kaj se oni tuŝas ilin per la korpoparto, kiu doloras, ĝi devas kuraciĝi. Sur la ŝtonaj monumentoj estas ankaŭ skribitaj inspiraj poemoj de la forpasintaj gvidantoj. Ŝtonoj estas gravaj por japan-stilaj ĝardenoj (eble ĉar Japanio mem estas ŝtoneca lando) : ili estas grava parto de ŝinto-sanktejoj, budhistaj temploj,





parkoj kaj palacoj. La etaj blankaj ŝtonetoj sur la grundo reprezentas purecon. Certe, ne maltrafendas la grandega Esperanto-ŝtono, sur kiu estas skribita « Unu Dio, Unu Mondo, Unu Interlingvo » — devizo de Oomoto.

La unua parto de la malferma ceremonio konsistis

el Oomoto-diservo (ŝinto-stila — ja Oomoto estas bazita sur ŝintoismo). Fakte, ĝi estas vera spektaklo, kiun komencas la tradicia japana muziko. Same kiel te-ceremonio, ĉiuj moviĝoj de la partoprenantoj en la rito de manĝaĵ-oferaĵoj estas tre graciaj kaj bone ellernitaj, kaj oni portas vestaĵojn tradiciajn por ŝintoismo. En certa momento de la diservo oni invitas la eksterlandajn vizitantojn (t.e. nin, du personojn el Tajlando kaj unu el Mongolio) oferi pinajn branĉetojn kun blankaj paperoj antaŭ la altaro.

Post la diservo komenciĝas la efektiva malfermo de la festivalo, kun oficialaj salutoj, k.s. Oni petas nin (kaj la aliajn alilandajn gastojn) saluti la ĉeestantojn — kion ni faras en Esperanto kun traduko en la japanan. Tamen poste atendas nin granda surprizo : la Spirita Gvidantino de Oomoto alvenas kaj, antaŭ ol preni sian lokon sur la podio, haltas por saluti la alilandajn gastojn — vere grandega honoro ! (Tamen eĉ plia surprizo atendis nin post la ceremonio — pere de Toŝi, ni ricevis de ŝi du belegajn te-tasojn, faritajn laŭ ŝia propra dezajno !) La Spirita Gvidantino tiam aliras la podion, riverencas kaj komencas sian paroladon — Esperante ! Fakte ŝi kutimas fari tiel — respekte al la devizo de Oomoto (« Unu Dio, Unu Mondo, Unu Interlingvo »), ŝi komencas kaj finas ĉiun sian paroladon en Esperanto.





La Oomoto-sanktejo en Ajabe

## Nebula Ajabe

Oomoto havas du centrojn — unu en Kameoka, kaj alian en Ajabe, urbeto kun tridek mil loĝantoj, ĉirkaŭata de altaj montoj, ĉ. unu horon aŭte de Kameoka. Ni iras tien por nur unu tranokto.

Onidire, Kameoka estas la « nebula urbo » — sed ni vidas pli da nebulo ĝuste en Ajabe. Ial ĉie en Japanio — sed eĉ plie en Ajabe, frumatene — la nebulo estas tiom densa, kaj la nuboj estas tiom proksime al la tero, ke ili kvazaŭ kaptiĝas en la kronoj de la arboj.

Se Kameoka estas misia centro de Oomoto, Ajabe estas ĝia spirita centro, kie troviĝas la ĉefa sanktejo : Ĉoosej-den (« Halo de Longa Vivo »), kaj kie fakte naskiĝis Oomoto. Konstruita antaŭ ekzakte 20 jaroj, por la 100-jariĝo de Oomoto, ĝi aspektas kiel tute nova kaj ankoraŭ odoras je freŝa ligno. Ĉoosej-den estas konstruita laŭ antikva japana maniero — tute sen najloj. La nomoj de la

du ĉefaj ĉambroj estas Gruo kaj Testudo : tiuj du bestoj reprezentas longan vivon (laŭ legendo, gruo vivas mil jarojn, kaj testudo dek mil jarojn).

En malnova sanktejo de Ajabe troviĝas ekspozicio de pluraj artaĵoj de DEGUĈI Onisaburo kaj atestaĵoj pri internaciaj ligoj de Oomoto : jen la plena kostumo de anglikana pastro el Usono — James Parks MORTON, kiu gvidis anglikanan diservon ĉe Oomoto, por reciproki la diservon, kiun Oomoto faris en la katedralo de Sankta Johano la Teologo (Novjorko) en 1982. Jen foto de la Dalai-Lamao, kiu vizitis tiun ĉi lokon antaŭ iom da tempo, kaj jen la foto de Oomoto-karavano al Mekko. Joel demandas, kiel ili sukcesis viziti ĝin, estante ne-islamanoj? La respondo estas simpla : la invitinta muftio deklaris, ke Oomoto *estas* Islamo !

Aliaj nepraj vidindaĵoj en la Ajabe-centro estas malnovega ligna domo kun pajla tegmento,





konstruita en la 17a jarcento (vidu la bildon antaŭe) — ĝi eĉ nun servas kiel ejo por ceremonioj — kaj lago kun insuloj, kiuj samtempe reprezentas la kvin kontinentojn kaj kvin insulojn de Japanio (nun estas nur kvar ĉefinsuloj de Japanio — sed kiam oni kreis ĉi tiun lagon Tajvano estis parto de Japanio — tiel kvin).

Nia ĉambro en Ajabe estas tradicia japana tatama ĉambro, kaj vespere nin atendas nekutima sperto : baniĝo en la komuna japana banejo, kiel *sentoo*. Por iuj ne-japanoj tio povus esti iom ŝoka. Tradicie, japanoj ĉiam havis komunajn banejojn, kaj antaŭ la usona okupacio ili eĉ estis ofte komunaj por viroj kaj virinoj. Malsame al eŭropanoj/nord-amerikanoj, kiuj duŝas sin starante kaj baniĝas kuŝante, japanoj duŝas sin sidante sur malalta plasta seĝo, kaj baniĝas sidante. Fakte, ne temas pri baniĝo (por laviĝi), sed pri simpla sidado en la bankuvo por malstreĉiĝi, jam post la duŝo — kaj la akvo restas en banejo kelkajn tagojn.

Ĉie en Japanio estas tre striktaj reguloj pri ŝuoj : oni portas pantoflojn en ĉiuj lokoj, krom en tatamaj ĉambroj (kie oni tute ne portas ŝuojn) kaj krom en necesejo (por kiu ekzistas specialaj



pantofloj). Ĉiuj lokoj, kie oni surmetas (aŭ forprenas) pantoflojn, estas indikitaj per alia alteco. En Ajabe-centro estas eĉ tri specoj de pantofloj : unu plia speco de pantofloj estas nur

por la manĝejo. La ŝuoj (ĉiam samgrandaj) ĉiam estas provizitaj en abunda kvanto.

La apogeo de la tritaga festivalo estis la dancokonkurso kaj la festeneto. La partoprenantoj dancis ĉirkaŭ la muzika podio — ĉiuj movoj kaj turniĝoj estas bone orkestritaj kaj aspektis ege facilaj (kvankam kiam mi provis mem partopreni, mi komprenis, kiom malfacila ĝi

fakte estas !). Multaj junuloj kaj infanoj portis tradiciajn vestaĵojn. Fakte, ankaŭ la festeneto mem estis konkurso : ĉiuj teamoj preparis diversajn bongustaĵojn, kaj oni povis « aĉeti » kelkajn el ili per specialaj kuponoj. La gejunuloj laŭte ĝojis, kiam oni elektis ilin kaj ne la teamon apude. Tre nekutima estis la glaciaĵo, kiu fakte estis... vera glaciaĵo — t.e. pecetoj da glacio, sur kiu oni metas siropon laŭplaĉe.

*(daŭrigo sekvos)*

# Serĉo de latineco kaj de reguleco

*Silvano La Lacerto Auclair*



*Un projet de langue auxiliaire internationale semble avoir atteint un équilibre presque parfait entre naturalisme et régularité, l'occidental. Son auteur, d'abord espérantiste, a pu mettre au point des règles permettant une dérivation verbale facile et d'apparence naturaliste.*

Inter la lingvoj, pri kiuj mi parolis al vi en ĉi tiu serio, iuj inklinas ĉefe al reguleco (kiel Kotava kaj Uropi), aliaj al la tiel nomata internacieco (kiel Sambahsa-Mundialect), sed tre ofte tiu internacieco plejgrade konsistas el latineco, kiel ĉe Interlingua.

Nu, ekzistas lingvo, kiu verŝajne sukcesis atingi sufiĉe bonan ekvilibron inter tiuj du streboj. Temas pri la lingvo *Occidental*, kiu ŝanĝis sian nomon al *Interlingue* komence de la Malvarma Milito.

Estas interese rimarki, ke la kreinto de Occidental, S-ro Edgar von Wahl, naskiĝis en Rusio, same kiel D-ro Zamenhof (li mortis en Estonio, mallonge jam parto de Sovetio), kaj jam en la komenco li interesiĝis pri Esperanto. Oni asertas, ke li faris la ununuran ŝanĝon en la frua gramatiko de Esperanto : en la Unua Libro, la tempaj tabelvortoj

estis *ian, tian, kian, ĉian, nenian*, kun tiu fino N retrovita en *quando, quand, when, wann*. Kompreneble, tio koliziis kun la akuzativa formo de la serio *ia, kia...* Tial la ŝanĝo. Kio tamen estas certa, estas ke li voĉdonis jese en la fama referendumo de 1894, post kiam li forlasis Esperanton.

Li, evidente, deziris lingvon internacian, en kiu la « internaciaj » formoj estus retrovitaj : li ne ŝatis tiajn vortojn kiel *kreado* kaj *kreito*, apud la vaste rekoneblaj formoj *creation* kaj *creatur*. Sed kiel kunigi tion kun la alte dezirinda reguleco kaj facileco de internacia lingvo?

Lia solvo troviĝas en lia verba derivsistemo. Verboj de Occidental finiĝas per unu el la tri vokaloj a, e kaj i. En infinitivo, ni retrovos, ekzemple, *crear, exploder, expedir*. El tiuj bazaj formoj, oni aplikas la jenan simplan regulon :



Forigu la finan r aŭ er. Se la lasta litero estas :

vokalo, aldonu t ;

d, g, r : ŝanĝu al s ;

alia konsonanto : faru nenion.

Krome, estas nur SES neregulaj verboj : *ceder, sider, mover, tener, venir* kaj *verter*.

Tiuj estas *la reguloj de von Wahl*. Per ili, oni **regule**, el *crear, expedir* aŭ *exploder* formas vortojn kiel *creatura, expeditor, explosion*, kiuj estas facile rekoneblaj de pluraj popoloj.

Poste oni devas distingi inter la stataj kaj la aktivaj verboj (en Occidental : *verbs static e dynamic*) por elekti la ĝustajn derivitajn formojn. La fakto ekzisti, ekzemple, ne estas *existion*, sed *existentie* (prononcu *ekzistencje*).

## Kial Occidental ?

Male de Esperanto, Occidental plene agnoskas la fakton, ke ĝia vortaro grandparte devenas de eŭropaj, precipe latinidaj lingvoj, en tiu grado, ke parolanto de iuj el tiuj lingvoj verŝajne povas legi Occidental-an tekston sen antaŭa lernado. Sed la reguleco de la lingvo kaŭzas ankaŭ tion, ke tiu lingvo verŝajne ne estas malpli facile lernebla de



Edgar de Wahl (plej dekstre)

alilingvano ol Esperanto. Ekzistas en Occidental bona aro de prefiksoj kaj afiksoj (tamen, malpli sistema ol tiu de Esperanto), konjugacio estas tre simpla (pli ol en Esperanto), sintakso estas sufiĉe malrigida (tamen, sen akuzativo...) kaj tiel plu.

Occidental ne sekvas la regulon « unu sono — unu litero », sed la prononc-reguloj estas sufiĉe simplaj. Fakte, mi certas, ke ĉiuj el vi ĝuste aŭdigis al vi la prononcon de la vorto *Occidental*, kvankam en ĝi la du C-oj ne havas la saman sonon... Mankas supersignoj — krom unu, por signi neregulan akcenton.

Fakte, en iuj okazoj, Occidental estas eĉ pli skemisma ol Esperanto. Ekzemple, el la demandvortoj *quant* kaj *qual*, respektive *kiom* kaj *kia*, oni tute regule derivas la vortojn *quantitá* kaj *qualitá*, kiuj ja devus esti en Esperanto *kiomeco* kaj *kiaeco*, kaj ne *kvanto* kaj *kvalito*...

## Finaĵoj

En Occidental substantivoj kaj adjektivoj ne havas identigajn finaĵojn. Fakte, ŝajnas, ke neniu natura lingvo en tiu tereno funkcias, kiel Esperanto. Nu... Substantivoj povas finiĝi per iu ajn litero : tial oni

facile rekonos vortojn kiel *colibrí, emu, cangurú, nirvana, pashá*. Tamen, pluraj substantivoj finiĝos per E (plej ĝenerala finaĵo), per A (ĉefe aktiveco kaj ties loko, aŭ ino), per O (ĉefe objektoj, kaj viroj), per U (ĉefe abstraktaĵoj). Tiuj diversaj finaĵoj povas ankaŭ ludi rolon en derivado : vortoj kun U, ekzemple, faros adjektivojn kun -al : *manu, manual ; gradu, gradual*. I ofte uziĝas por adjektivoj.

Seksoj estas relative egalece esprimataj. Tre ofte, neŭtra formo finiĝos per E aŭ per konsonantoj, dum viroj alprenos la finaĵon O, kaj inoj, la finaĵon A : *yo have du filies, un filio e un filia*. Tamen, se *fisico* (aŭ *physico\**) ja signifas fizikisto, *fisica* signifas... fiziko. Kvankam ekzistas ankaŭ la vorto *fisicist*, kun eblaj seksaj finaĵoj, tia neekvilibro estas al mi bedaŭrinda.

Tiu manko de rigideco ĉe la finaĵoj ebligas pli efike reuzi la radikojn : *sol* signifas sola, kaj *sole*, suno ; *númere* estas nombro, kaj *numeró*, numero ; *posta* estas poŝto, kaj *postó*, posteno ; *hor* kaj *hora* estas horo, sed la unua montras daŭron, la dua, momenton ! La fakto, ke tiuj alternoj inter A kaj O respondas al la genroj en latinidaj lingvoj tute ne estas koincida, kvankam ne estas genroj en Occidental, bonŝance. Fakte, oni eĉ povus

retrovi la latinajn formojn de tiuj finaĵoj, iel kiel en Latino sine flexione.

## Vorttrezoro

Plej multajn vortojn de Interlingue facile komprenos esperantisto, kaj facile komprenos franclingvano. Occidental estas iom pli latineca ol Esperanto, sed ne tiel, kiel oni povus imagi : ja

estas vortoj kiel *affirmar, reprimandar, cude* (kubuto). Eĉ troviĝas la vorto *pom*, kvankam tiu vorto ekzistas preskaŭ nur en la franca ! Sed estas, kiel en Esperanto, (malgranda) spaco por ĝermandevenaj vortoj, kiel *spegul, nin* (naŭ), *storc* (cikonio), *svimmar* (naĝi), *strax* (tuj), *yes* kaj *no, self*.

Plej multaj seksaj opozicioj estas markitaj per la fina vokalo, kvankam ekzistas kelkaj paroj, kiel *matre/patre, sestra/fratre, tanta/oncle, femina/mann*.

Foje lingvema esperantisto povos aprezi la ĝustan lokon de akcento en vortoj, kiel *abdómine* aŭ *ánim*, aŭ la simetrio inter *ante, pos, antey, poy* (antaŭ, post, antaŭe, poste). Oni povos ankaŭ miri antaŭ la uzo de la prefikso *ho*, de *hodíe*, per kiu oni povas krei vortojn kiel *hoannu, hosemana, hotémpor...* Tamen vortoj kiel *partú, sempre, chascun* kaj *omni* (ĉie, ĉiam, ĉiu kaj ĉiuj) eble montras mankon de sistemeco.



**Flago de  
Occidental**



## Ĝeneralaj konsideroj

Tre malmultaj homoj parolas Occidental-on, kaj ili ne aspektas al mi tre organizitaj aŭ aktivaj. La troveblaj vortaroj estas truaj (mi trovis la du dulingvaj vortarojn kun Esperanto, sed mankis al ĝi, ekzemple, la vorto por vendredo [*venerdì*, trovita en angla vortaro], kaj ili, evidente, estas aŭtomata transskribo de papera versio), kaj mi ne trovis metodon ; mi tamen povis legi rekte la gramatikon, en Occidental. Interesa projekto, bedaŭrinde aŭ bonŝance, sen videbla estonteco. Por pli da informoj, iru al [www.interlingue.org](http://www.interlingue.org)

\* Simile kun Interlingua, Occidental acceptas du ortografiojn, iun pli etimologian, la alian pli fonetikan. Ĝi ankaŭ akceptas du formojn por la estonta tempo kaj la fiktiva modo : *yo va far*, *tu vell far* (mi faros, vi farus) kaj *yo fará*, *tu faría*. Estas notinde ke, kiel en Esperanto, la verboj ne ŝanĝiĝas laŭ personoj, sed, male de Esperanto, ili uzas la verbon *har* ( $\neq$  *haver*) kiel aktivan helpverbon.

### Ekzemplo :

## Quel es do li spírítu de Occidental !

Li max principal qualitás de nor lingue es, que Occidental es international, autonom, clar, transparent e regulari, modern e vivent.

*International* ne significa que it es un conglomerate de paroles electet secun un principie de majorité, quam

Idiom Neutral o Ido. It significa que per su form it sta inter li national lingues, talmen que su distantie al national lingues es minu grand quam ti inter ili self. It es quasi median inter ili, quasi mediator.

Quam *autonom* it have su propri ortografie e fonetica, a quel it adapta omni su paroles e formes, su expressiones e frases.

Occidental es *clar e transparent* per li *regularitá* de su structura, por responder al postulationes del intellectu, del facilitá necessari ne solmen por erudit latinistes e romanes ma por omni persones stant in relationes international.

It es *modern*, to es : evoluet in li sense quel monstra nos nor grand lingues e lor populari dialectes, anc si che ili es remarcet solmen rudimentes de tal evolution. It es modern in su tendentie a brevitá e fluentie. It es modern per su parol-formation, per li elimination de pesant scientific mortal'a, per su analytism in grammatica. *It ne es latin*, to ne mey obliviar latinistes. Latin es un mort pre-avo de Occidental.

It es *vivicapabil*, *vivent*, organicmen evoluet e ne mecanic mixture, it es un individualité e ne un mosaica, u on posse compensar un pezze per quelcunc altri.

Un tal ente on ne posse « correcter » o « reformar » secun li gustas del divers criticantes e pedantes. On posse solmen plu e plu adaptar e polir ti elementes queles ancor ne ha totalmen assimilat se al caractere e spírítu de ti vivent lingue occidental.

(E. de Wahl, *Naturalitá e Regularitá*, en *Cosmoglotta*, 1929)



## Tra la mondo per biciklo kaj Esperanto de Lucien A. Péraire (1906–1997)

*Francisko Lorrain*

*Un espérantiste français de 22 ans part en 1928 pour un long voyage à bicyclette autour du monde, à travers l'Europe, l'URSS, la Mandchourie, le Japon, la Chine, le Viêt-Nam et Java. Revenu en 1932, ce n'est que longtemps après, en 1974, qu'il publiera le récit de son extraordinaire périple.*

Jen libro pri tute malordinara vojaĝo de franca esperantisto. Ĝi daŭris de 1928 ĝis 1932. Li estis ĉarpentisto, sed ŝategis legi kaj studi, kaj lernis Esperanton koresponde dum sia militservo. Post ĉi ties fino, li decidis fari mondvojaĝon biciklan, kune kun germana kamarado, Paul Posern, orpoluristo. Ili kune foriris el ĉi ties hejmo en aŭgusto 1928, direkte al oriento. Ili eniris Sovetunion trajne, en oktobro.

Laŭlonge de sia vojaĝo ili, kompreneble, renkontis senfinajn malfacilaĵojn, rilate vizojn, transirpermesojn, vintran veteron, malbonajn vojojn, malsanojn, ktp. Fakte, tiam en Sovetunio en multaj lokoj apenaŭ estis vojoj. Ofte la

ununuran vojiron prezentis la fervojo ! Foje estis pado flanke de la vojo, sed foje tute ne, kaj tiam estis tre malfacile. Tamen la loĝantoj estis plej ofte ege akceptemaj kaj helpemaj. La vojaĝantoj eĉ ofte renkontis Esperantistojn, foje en la plej neatenditaj kamparaj lokoj. Tiam la sovetia reĝimo ankoraŭ ne persekutis la esperantistojn, kaj multaj homoj sciis almenaŭ iometon pri Esperanto. Alvenante en urbo, ili estis ofte atendataj de homamaso, ĉar ili kutimis anonci sian baldaŭan alvenon per letero al loka klubo aŭ al iu internacie konata esperantisto.

En ĉiu regiono ili devis ricevi novan vizon. Tial, ie en Kaŭkazio, ili estis devigataj disiĝi, ĉar Posern




ricevis la permeson pluiri, dum Péraire devis iri al Moskvo por revalidigi sian pasporton. Posern de tie atingis Iranon (vintre !), kaj plu biciklis laŭ la suda bordo de Mediteraneo, ĝis Hispanujo kaj poste Germanujo.

Ekde ilia disiĝo, Péraire do vojaĝis sole. Ie kaj tie oni ofertis al li labori kiel lignaĵisto, kion li volonte akceptis, por ricevi iom da mono. Li ankaŭ vendis poŝtkartojn kun fotoj de li kaj lia biciklo, kiujn multaj entuziasme aĉetis.

Moskve, majo de 1929, li rapide reakiris validan vizon kaj foriris cele al Vladivostoko kaj Japanujo, laŭ la transsiberia fervojo. La oficialaj instancoj konsideris lin kiel frenezulon, sed li havis la apogon de asocio nomata « Avtodoro »: « Asocio por disvastigo de aŭtomobilaj vojoj kaj ĝenerale de modernaj transportiloj ». Tiu asocio helpis lin konstrui aparaton ebligantan lin bicikli sur la reloj mem de la fervojo : vidu la ĉi-supran ilustraĵon, tiritan el la libro. Li eĉ ricevis oficialan permeson por tiel surrele veturi ! Ĉiuj gazetoj raportadis pri tio kaj lia vojaĝo.

Printempe de 1930, li trairis parton de Ĉinujo kaj



Manĉurujo kaj atingis Vladivostokon en julio. Li forlasis tie sian relbiciklan aparaton, kiun oni deponis en la muzeon de la tiea Aŭtomobila Klubo.

De tie li transiris al Japanujo. Li skribis : « Mi ne timas tuj diri, ke por mi, laŭ ĉiaj vidpunktoj, tiu nacio kaj ĝia popolo estis la plej civilizita en tiu tempo. » Tiu

lando ja forte impresis lin, kvankam li neniel admiris la tiaman japanan imperiismon.

Post tio, novembre de 1930, li iris al Ĉinujo, kvankam ĉiuj malkonsilis tion al li pro la tiamaj malordoj tie. Tamen li sukcesis transiri grandan parton de la lando, de Ŝanhajo ĝis Kantono, el kiu li veturis al Vjetnamujo, en julio 1931. Ĉi-lastata lando estis tiam tre malgaja loko. La Franca koloniado tie estis ege malbela afero. Krome, tiam estis la tempo de la granda monda krizo kaj eĉ la tieaj francoj vivis malriĉe ; imagu, kiel vivis la vjetnamoj !

Kun malmultaj esceptoj, la francaj konsulejaj oficistoj, kiujn li renkontis en Azio, havis ege malagrablan sintenon rilate lin, ne nur pro tio, ke li faris ja iom frenezan kaj danĝeran vojaĝon per biciklo, sed ankaŭ ĉar li estis simpla laboristo, sen

rilatoj kun pli altklasaj homoj. Li havas malmultajn laŭdajn vortojn pri tiuj reprezentantoj de lia devenlando.

Post tio li iom vizitis Kamboĝon, poste Javon, kaj tiam revenis ŝipe al Japanujo, haltante en Tajvano, tiam okupata de la japanoj. Li forlasis Japanujon en 1932. Li konkludas :

« Jen la vera leciono de mia bicikla vagado :  
**Esperanto pruvis al mi, ke la tuthomara fratigado ne estas utopio, ĝi estas ebla**, kia ajn estas la religio, la raso, eĉ klaso aŭ nacieco de ĉiuj homoj. »

Li ne rakontas en la libro ekzakte, kiel li revenis hejmen. Laŭ Vikipedio « Li trairis Azion kaj Eŭropon per trajno » — ŝajne sen sia biciklo, eble forlasita ie en Azio.

La unua eldono de la libro aperis longe post la vojaĝo, en 1974, ĉe eldonejo nomata « La Juna Penso ». Mi legis la duan eldonon de la libro, pli ampleksa ol la unua, aperigita en 1990 de « SAT-Broŝurservo » kaj la gazeto « Laŭte ! ». Ekzistas tria eldono, el 2007, havebla ĉe libroservoj. La libro estas nur 107-paĝa kaj kostas 3,60 € ĉe UEA. Malmultkoste, por valora legaĵo !

Pliaj informoj troveblas en Vikipedio:  
[eo.wikipedia.org/wiki/Lucien Péraire](http://eo.wikipedia.org/wiki/Lucien_P%C3%A9raire)

## La latina modernigās

*Silvano Auclair*

Oni ofte primokis la klopodojn uzi la latinan lingvon kiel modernan internacian lingvon, pro la manko de vortoj reprezentantaj modernajn konceptojn. Ĉar Katolika Eklezio sentis tiun mankon — ĝi ja eldonas gravajn tekstojn en tiu lingvo — ĝi antaŭnelonge publikigis liston de novaj latinaj vortoj. Nu, pli ekzakte, liston de novaj plurvortaj konceptoj. Kvankam la listo havas la kapvortojn en la itala, mi nun povas paroli en la latina pri aldonvalora imposto<sup>1</sup>, kafejo<sup>2</sup>, etna purigado<sup>3</sup>, montara promenbastono<sup>4</sup>, maharaĝo<sup>5</sup> aŭ edelvejso<sup>6</sup>. Se mi nur memorus la gramatikon...

1 *fiscāle prĕtii additamentum*

2 *taberna cafaeária* (kafa butiko)

3 *purgátio géntica*

4 *montanus báculus*

5 *Índicus régulus* (hinda reĝeto)

6 *leontopódium alpinum*

[http://www.vatican.va/roman\\_curia/institutions\\_connected/latinitas/documents/rc\\_latinitas\\_20040601\\_lexicon\\_it.html](http://www.vatican.va/roman_curia/institutions_connected/latinitas/documents/rc_latinitas_20040601_lexicon_it.html)





## La kompatinda sorto de Melpomenus Jones

*Stephen Leacock\* (1869–1944)*

*Tradukis Stéphane Brault*

Iuj — nek vi nek mi, dank' al nia ŝtalsimila aplombo — sed iuj havas egan malfacilecon adiaŭi, kiam ili vizitas amikojn aŭ pasigas vesperon ĉe ili. Proksimiĝas la momento, kiam la vizitanto sentas, ke li nun sendube rajtas foriri ; li leviĝas kaj deklaras subite : « Bone, ŝajnas al mi... ». Kaj oni tuj respondas : « Ho, ĉu vi devas foriri nun ? Nu, ankoraŭ estas frue ! », kaj deprimanta ĝentileco-barakto tiam sekvas.

Laŭ mi, la plej malĝoja kazo tia, pri kiu mi iam aŭdis, estas tiu de mia povra amiko Melpomenus Jones, vikario — vere simpatia junulo, nur dudektri-jara ! Li simple ne povis adiaŭi. Li estis tro modesta por mensogi, kaj tro religiema por eĉ riski ŝajni malafabla. Iam okazis, ke li iris viziti amikojn ĝuste la unuan posttagmezon de sia



somera ferio. La venontaj ses semajnoj estis tute liberaj — absolute nenio farenda. Li babilis iom da tempo, trinkis du tasojn da teo, pretigis sin por la strebo kaj subite diris :

« Bone, ŝajnas al mi, ke... »

Sed la dommastrino rebatis : « Ho, ne ! Sinjoro Jones, ĉu vi ne povas resti iom pli ? »

Ĉiam verodira estis Jones. « Ho jes », diris li, « kompreneble, mi — hm — povas resti. »

« Do ne foriru, mi petas. »

Li restis. Li trinkis dek unu tasojn da teo. La nokto estis alvenonta. Li leviĝis denove.

« Bone, nun », li flustris timeme, « mi pensas, ke mi vere... »

\* Stephen Leacock estis fama kanada humura verkisto anglalingva

« Ĉu vi devas foriri ? » diris la gastigantino. « Mi esperis, ke vi restos por la vespermanĝo... »

« Nu, be... Mi certe povus », balbutis Jones, « se... »

« Do restu, mi petas. Mi estas certa, ke mia edzo estos ravita. »

« Konsentite », respondis li malforte, « mi restos », kaj li residiĝis fale, da teo plena kaj tute mizera.

Paĉjo revenis hejme. La familio vespermanĝis. Dum la tuta manĝo, Jones, sidanta ĉe unu ekstremo de la tablo, firme planis foriri je la oka kaj duono. Ĉiu familiano demandis sin, ĉu Jones estas stulta kaj paŭtema, aŭ nur stulta.

Post la vespermanĝo, Panjo entreprenis « eltiri » lin, montrante al li fotografaĵojn. Ŝi montris la tutan familian muzeon — plurajn skatolojn de flaviĝintaj bildoj : fotoj de la onklo de Paĉjo kaj lia edzino, kaj la frato de Panjo kun lia fileto, kaj terure interesa foto de amiko de la onklo de Paĉjo en sia uniformo de Bengala Lancisto, kaj terure bone farita foto de la hundo de la partnero de la avo de Paĉjo, kaj terure petolema foto de Paĉjo



vestita kiel demoneto por almozfondaĵa balo.

Je la oka kaj duono, Jones estis ekzameninta sepdek unu fotojn. Pli-malpli restis sesdek naŭ. Jones leviĝis.

« Mi devas adiaŭi, nun », li anoncis bleke.

« Adiaŭi ! », ili ekkriis.  
« Apenaŭ estas la oka kaj duono. Ĉu atendas vin ia urĝaĵo ? »

« Ne », li agnoskis, kaj li angore murmuris ion pri ses semajnoj pasigotaj ĉi tie, kaj funebre ekridis.

Ĝuste tiam reveliĝis, ke la preferata infano de la familio — ĉarmega petolemuleto — estis kaŝinta la ĉapelon de S-ro Jones, do, Paĉjo diris, ke li devas resti, kaj li invitis lin fumi pipon kaj babili. Paĉjo fumis la pipon kaj altrudis la babilon al Jones, kiu plue restis. Ĉiumomente, Jones intencis ekagi, sed li ne povis. Baldaŭ, Paĉjo ege senpacienciĝis pri Jones kaj ekbaraktetis, kaj fine deklaris duonsarkasme, ke pli bone estus, ke Jones pasigu la nokton ĉi tie : ne eblas sin liberigi de li. Komprenante laŭvorte, Jones dankegis lin kun larmoplenaj okuloj, kaj Paĉjo kuŝigis S-ron Jones en la gastoĉambro, kaj elkore malbenis lin.



Post la mantenmanĝo, la morgaŭon, Paĉjo iris urben al sia laboro, lasante la korŝiritan Jones amuzi sin kun la bebo. Lia kuraĝo estis vaporiĝinta. La tutan tagon li volegis foriri, sed formiĝis en lia menso la ideo, ke li simple ne plu povas. Kiam Paĉjo rehejmis vespere, la daŭra ĉeesto de Jones surprizis kaj ĉagrenis lin. Pensante manovrigi lin per ŝerco, li diris, ke eble li devus pagigi lin por la pensiono, ha-ha-ha. La povra junulo momente rigardis lin kun vakua mieno, premtordis la manon de Paĉjo, antaŭpagis pensionon por unu monato, kolapsis kaj singultis kiel infano.

La tagojn poste, li estis malgajega kaj nealparolebla. Li pasigis, kompreneble, sian tutan tempon en la salono, kaj la manko de freŝa aero kaj ekzerco komencis efiki malbone je lia sano. Ĉiutage, li trinkis teon kaj rigardis fotojn. Li restadis horojn kvazaŭ hipnotizita antaŭ la foto de la amiko de la onklo de Paĉjo en sia uniformo de Bengala Lancisto, parolante al ĝi, foje sovaĝe



alfaŭkante ĝin. Videble, lia mensosano estis malfortiĝanta.

Fine, la krizo eksplodis. Oni portis lin supren, al la etaĝo, kie li restis kuŝinta en stato de febra delirego. La sekvantaj tagoj estis teruraj. Li rekonis neniun, eĉ ne la amikon de la onklo de Paĉjo en sia uniformo de Bengala Lancisto. Foje li eksidiĝis en la lito kaj ekkriis : « Nu, ŝajnas al mi, ke... », kaj refalis kontraŭ la kapkusenoj kun hida rido. Tuj poste, li rekomencis, kriante : « Pli da teo ! Pliaj fotoj ! Pliaj ! Ha ! Ha ! »

Finfine, post monato de agonio, la lastan ferian tagon, li forpasis. Oni diras, ke, kiam alvenis la plejsupra momento, li sidiĝis en sia lito kun mirinda memfida rideto sur la vizaĝo kaj diris : « Nu... vokas min la anĝeloj. Ŝajnas al mi, ke nun mi vere devas foriri. Bonan posttagmezon. »

Kaj la impeto de lia animo for de sia malliberejo-hejmo estis tiel rapida, kiel la salto de kato trans ĝardenan barilo.

# Fondiĝo de ESF-enrete dum la ESF- kunsido en Montrealo

**ESF fondas plen-proprietan filion por mastrumi la daŭran disvolvado de projektoj kiel lernu.net, la bone konata multlingva retejo por lerni Esperanton.**

En Montrealo, dum sia jara strategia sesio, la ESF-estraro nomumis Erin Piatieski kiel fandan ĝeneralan direktoron de la nova kompanio, kiu estos registrita en Vaŝingtono, Usono, sub la nomo ESF-enrete.

« Nia celo estas igi la diversajn retprojektojn finance memstaraj, kaj samtempe certigi ke tiuj projektoj ne ekdominos la tutan prioritataron de la Fondaĵo,» diris ESF-prezidanto Mark Fettes. « La evoluo de Lernu ege kuraĝigas nin, kaj ni daŭre konstruos sur ĝia sukceso. Dum la pasintaj kelkaj jaroj Erin grave rolas en la strategia planado de niaj retprojektoj, kaj ni ĝojas bonvenigi ŝin en ĉi tiun novan rolon. »

Mekanika inĝeniero diplomita de MIT (Masaĉuseca Instituto de Teknologio en Kembriĝo, Masaĉuseco, Usono), Piatieski estas aktive engaĝita kun Lernu jam de antaŭ ties lanĉo en 2002. Kiel ĝenerala direktoro ŝi proksime kunlaboros kun aliaj membroj de la kerna mastruma teamo de la retejo. Ŝiaj prioritatoj

inkluzivas strategian planadon, kreadon de partnerecoj kun individuoj kaj organizoj, kaj mastrumadon de la centoj da volontuloj de la retejo.

« Lernu jam estas la plej granda enreta komunumo de Esperanto-parolantoj kaj lernantoj, » rimarkis Piatieski. « ESF ludis esencan rolon en la disvolvado de la retejo, kaj ni antaŭĝuas ampleksigi ĉi tiun rilaton per ESF-enrete. Laŭ ni, la projekto estas en unika pozicio stimuli kunlaboron inter Esperanto-parolantoj tutmonde kaj plividebligi Esperanton ĉe la ĝenerala publiko. »

Unu plena tago de la montreala kunveno estis dediĉita al planoj por modernigi kaj ampleksigi Lernu per novaj kursoj, forumoj, kaj ampleksa biblioteko, ĉiuj integritaj en plibonigitan teknikan fundamenton. Lanĉo de la nova retejo estas planata por proksimume koincidi kun la deka datreveno de Lernu. *[el Esperantic.org]*

**La Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto ([vortaro.net](http://vortaro.net)) nun estas konsultebla ĉe la Reto. Vi povas ensaluti per via Lernu-ensaluto (aŭ, se vi ne havas, vi devos registriĝi).**



# ESF plifortigas la Esperanto-movadon tutmonde

Ĉu vi sciis, ke nun Lernu.net havas preskaŭ 130 mil registritajn uzantojn, kaj ke el ili ĉ. 22 mil loĝas en Nord-Ameriko? Kun kelkaj milionoj da paĝvizitoj ĉiumonate, Lernu.net estas la plej granda E-retejo kaj Esperanto-komunumo en la mondo. Dekomence, la paĝaron fincas la fondaĵo Esperantic Studies Foundation (ESF), inter multaj aliaj projektoj grandaj kaj malgrandaj. **La laboron de ESF ebligas la donacado de esperantistoj.**

Ne nur Lernu, sed ankaŭ Edukado.net (retaj rimedoj por instruistoj de Esperanto), Pasporto al la Tuta Mondo (rektmetoda video-kurso), Springboard2Languages (eduka eksperimento en britaj bazlernejoj), kaj la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ricevis financon subtenon de ESF – kaj tiuj estas nur kelkaj ekzemploj el la eduka kampo.

ESF uzas siajn rimedojn por **konkretaj projektoj, kiuj antaŭenigas Esperanton**, edukadon kaj interlingvan justecon. La fondaĵon gvidas estraro de konataj usonaj kaj kanadaj esperantistoj. Vi povas ekscii pli pri la agado de ESF vizitante ĝian retejon [esperantic.org](http://esperantic.org). Eblas donaci unufoje, ekzemple per PayPal aŭ via UEA-konto, aŭ enskribiĝi por ĉiumonata donacado.

Per kreskigo de la kapitalo de ESF, **vi plifortigos la Esperanto-movadon tutmonde** ! Ĉar ESF laboras

por la longdaŭra evoluo de la movado, indas pripensi ankaŭ la eblecon testamenti al ĝi.

ESF bezonas vian subtenon. **Ni elkore dankas ĉiujn niajn donacantojn kaj petas konsideri fari donacon al ESF ĉi-jare !** *Adreso por ĉekoj* : ESF, COP Ste-Catherine, CP 60502, Montréal QC, H1V 3T8 (Canada) | *UEA-konto* : esfo-p



**Synnöve Mynttinen, Finnlando**

Ĉi-jare mi festas mian 25-jariĝon en Esperantujo. Dum lastaj jaroj en ĉiuj Esperanto-renkontiĝoj, kiujn mi partoprenis, mi sukcesis konatiĝi kun diversaj bonaj esperantoparolantoj, kiuj tiam partoprenis sian unuan Esperanto-kongreson, post kiam ili lernis Esperanton per Lernu.net. Ĉiam mi admiras ilian bonegan prononcadon kaj grandan vortrezoron. Bona ekzemplo estas la filmo de Rowland Goodbody en la filmejo de edukado.net. [www.lernu.net](http://www.lernu.net) kaj [www.edukado.net](http://www.edukado.net) estas nuntempaj metodoj instrui Esperanton por milionoj da homoj ĉie en la mondo samtempe efike kaj altkvalite laŭ ĉies personaj kapabloj. Esperantujo ne havas ekonomiajn rimedojn por kio ajn. Tial ni devas uzi la monon por plej fruktodonaj metodoj plivastigi la lernadon de la lingvo kaj plialtigi la lingvonivelon de homoj, kiuj jam iam lernis ĝin. Tial mi de tempo al tempo donacas monon al ESF, kiu, laŭ mia kompreno, ĝis nun sukcesis subteni multajn valorajn aferojn en nia Esperanto-komunumo en scienca kaj praktika nivelo.

# Lastaj renkontiĝoj



Japanana vespero



ESK-prezidanto kaj ESF-konsilanto Normand Fleury (maldekstre) kaj ESF-prezidanto Mark Fettes



Japanana vespero: komuna manĝo



Renkontiĝo de ESK kaj ESF-estraro en Montrealo



# Esperanto-renkontiĝoj

**6-8a de oktobro 2012: ARE**

**Silver Bay, NY**

**18-20a de majo 2013 : 10a MEKARO**

**Otavo, Ontario**

**20-27 de julio 2013: Universala Kongreso**

**Rejkjaviko, Islando**

**17-19a de majo 2014 : 11a MEKARO**

**Sherbrooke, Kebekio**

**16-18 de majo 2015: 12a MEKARO**

**Toronto, Ontario**

**21-23 de majo 2016: 13a MEKARO**

**Granby, Kebekio**

*provizore: 14 MEKARO (2017) : Kingstono (Ontario) ; 15a MEKARO (2018) : Montrealo (Kebekio)*

## Montrealaj Esperanto-Kunvenoj (MEK)

**Vendredo 12a de oktobro 2012, 18 h\***

**Commensal (sube)**

**Vendredo 26a de oktobro 2012, 19 h 30**

**MEDO**

**Vendredo 9a de novembro 2012, 18 h\***

**Commensal (sube)**

**Vendredo 30a de novembro 2012, 19 h 30**

**MEDO**

**Sabato 15a de decembro 2012, 18 h\***

**Commensal (supre)**

**153-a datreveno de L.L. Zamenhof**

\* Noto : manĝo je la 18-a , babilado ekde 19 h 30

Commensal St-Denis (restaurant végétarien ) : 1720, rue St-Denis (entre de Maisonneuve et Ontario, metro « Berri-UQAM »).

MEDO (Montreala Esperanto-Domo) • 6358-A, rue de Bordeaux • Montréal • H2G 2R8

# Esperanto-Societo Kebekia | Société québécoise d'espéranto

La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia kvarfoje dum la jaro : marte, junio, septembro kaj decembre. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Senpage por la membroj de la ESK. UEA-kodo de la Societo: kebk-d.

**Redaktado kaj grafiko** : Yevgeniya Amis (riverego(ce)esperanto.qc.ca). **Korektado kaj lingva konsilado** : Silvano Auclair kaj Francisko Lorrain. **Estraranoj de ESK** : Normand Fleury (prezidanto), Ian Wheeler (vic-prezidanto), Sylvain Auclair (sekretario-kasisto), Suzanne Roy (konsilanto), Den Drown (konsilanto).

**Limdato por la venonta eldono / Échéance pour le prochain numéro : 2012.11.20**

**6358-A, rue de Bordeaux • Montréal • H2G 2R8 | info(ĉe)esperanto.qc.ca • www.esperanto.qc.ca**

La Riverego (Le Fleuve) est publié par la Société québécoise d'espéranto quatre fois par année, en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux aux Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 1923-1067. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise avec mention obligatoire la source. Gratuit pour les membres de la Société québécoise d'espéranto.

**Rédaction et graphisme** : Yevgeniya Amis (riverego(à)esperanto.qc.ca). **Correction** : Sylvain Auclair et François Lorrain. **Administrateurs de la SQE** : Normand Fleury (président), Ian Wheeler (vice-président), Sylvain Auclair (secrétaire et trésorier), Suzanne Roy (conseillère), Den Drown (conseiller).



En plus de la Société québécoise d'espéranto, il existe au Québec plusieurs clubs d'espéranto. Pour ajouter votre club à cette liste ou annoncer une activité, écrivez-nous à riverego(à)esperanto.qc.ca



## Montreala Esperanto-Domo (MEDO)

6358-A, rue de Bordeaux, Montréal, H2G 2R8

Vidu retejon por vidi kiel atingi

Voir site web pour un plan d'accès

Libroservo, biblioteko nepre kun antaŭa rendevuo  
Librairie, bibliothèque sur rendez-vous seulement



## Pasporta Servo

Aliĝu tuj, se vi volas esti gastiganto kaj bonvenigi esperantistojn ce vi :

[www.pasportaservo.org](http://www.pasportaservo.org).

Vi povas ankau kontakti

Jenja Amis

(yevgeniya.amis(ĉe)gmail.com), kiu estas la peranto por Kanado.

